

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Japania-Korea Kongreso + Ekskurso

Sibayama Zyun'iti kaj Noriko

De la 4a ĝis la 6a de oktobro, en korea antikva urbo Jeonju [Ĝongŭ] okazis **la 3a Komuna Esperanto-Kongreso de Japanio kaj Koreio**, kaj la 7an kaj 8an okazis **Postkongresa Ekskurso** en ties ĉirkaŭaĵo. La kongreson aliĝis entute 269, inter ili kelkaj el nia Esperanto Jokohama. Kaj la ekskurson partoprenis ĉ. 40, inter ili ni kaj s-ro Inumaru el nia grupo. Nu tiu ĉi artikolo estas ĉefe pri niaj personaj spertoj.

### Al la kongresejo

Nia vojaĝo al la kongresejo, en la 3a de oktobro, tute dankas al s-ro Namba Fumiharu, per kies luaŭto de Incheon ni celis Jeonju. Vespere ni triope piediris, por certigi la venontagan kongresejon, Jeonju Nacia Universitato de



Pedagogio (JNUP). Tie ni renkontis laborantajn anojn de la Loka Kongresa Komitato. Kaj jen, oni invitis nin en la laborfinan vespermanĝon, kaj feliĉe ni gustumis la gastronomian specialaĵon de la urbo "bibimbap", t.e. rizaĵo kun diversaj kunmanĝaĵoj.

### En la kongresejo

Diversaj domoj en la Universitato estis uzitaj en la kongreso, kaj nin embarasis subita ŝanĝo de la ĉambroj, kiujn oni ne anoncis publike. Prelegojn faris koreoj multe, japanoj malmulte, kaj cetere multaj aziaj samideanoj, el Ĉinio, Indonezio ktp, parolis.

Okazis tie 1-hora Japania Kongreso, kaj paralele 1-hora Korea Kongreso. En la fotoj estas niaj anoj, s-ro Suzuki Keiichiro kaj Namba Fumiharu, kadre de la "Japania Kongreso". Cetere, la memserva tagmanĝo ĉe la universitata manĝejo estis tre bona al ni, ne ŝatantaj tro pikan guston.



### Postkongresa Ekskurso

En la 7a de oktobro, per 2 busoj, ni ekiris de Jeonju, kaj haltis ĉe Hanbok, kie ĉiuj ŝanĝis sian veston al korea tradicia vesto — vidu la fotojn —. Ni tiel plu iris buse turisme, kaj nur post tagmanĝo revestis nin. Posttagmeze ni vizitis Jeonbuk-Universitaton, kie studata estas korea tradicia konstruarto. Multaj ekskursantoj praktikis ligno-ĉizadon, sed ni du nur rigardis. Fine, ĉiuj ricevis donace tranĉtabulon, faritan en la universitato. (Tiun tabulon ni donacis al la Muzeo, por praktika uzo.) Poste ni vizitis templon kun plenflorantaj likoridoj. La tranoktejo estis ĉe Junulara Gastejo.

En la 8a, ni antaŭtagmeze vizitis Dolmen-ejon, nome kie grandaj ŝtonoj markas tombon, kaj muzeon pri tio. La tagmanĝo estis en Jeongeup, kie oni servis al nia grupo senpage de la urbo, kondiĉe ke ni post la manĝo libere promenas la tradician komercan straton. Tie nia Esperanto-gvidanto aĉetis por ni jujubojn. Posttagmeze, vizitinte historian muzeon pri Donghak [ 東學 黨 ], ni revenis al Jeonju. Tie ni kaj kelkaj kunkursanoj prenis trajnon ĝis Seulo.



## La 132-a Legokunsido

En la 6a de septembro 2024 okazis la 132-a legokunsido por “La senco de musa vivo” de Aleksandra Watanuki. Partoprenis 5.

### “La senco de musa vivo” de Aleksandra Watanuki

Sibayama Zyun’iti

Jen libreto kun dek-kelkaj ilustraĵoj kolorplenaj, faritaj de komputilo kun artefarita

intelekto, reĝisorita de la aŭtorino, en 37 paĝoj, do inda donaco al geknaboj.

Kaj la rakonto? Nu, knabo, estonta studento, abrupte fariĝas muso. Tiu fadeno memorigas al mi la absurdo-rakonton de Franz Kafka, sed ĉi tie, krom la korpoŝanĝo, la fadeno estas mal-absurda.

Alberto, la musiginta, komencas vivi musan vivon kun gvid-muso Sunflora, lernas kiel vivi en musaro, foje atencite de la hejma kato Rufo, amika al la knabo Alberto kaj lia fratino. En la makrosocio kie musoj, homoj kaj katoj kunvivas, musinoj naskas multe, sed musaro ne grandiĝas, (mal)dank' al homoj kaj katoj. Alberto lernas kiel manĝi, kiel dormi, kiel aventuri sed kiel forkuri, ekstere aŭ interne de homa domo. Laŭ la moderna termino, la vivo de musoj estas daŭripova. Mi opinias jene : Alberto ekkomprenas, ke “la senco de musa vivo” estas

tiu daŭripoveco. Tion li kiel matura homo devus teni en sia koro.

Nu, tamen kiel SF-amanto, mi supozas en mi paralelan rakonton, “la senco de homa vivo”. Lu superintelekta estularo foje sendus sian anon al la homa mondo, kaj homa gvidanto instruas al li la vivon de homoj; hominoj naskas, kaj homa mondo iom grandiĝas, (mal)dank' al musoj, katoj kaj al homoj mem. La homa vivo estis daŭripova, kun manĝo-feliĉo kaj senmanĝo-malfeliĉo, sed lastatempe tiu ekvilibra daŭripoveco rompiĝis ktp ktp. Tiel tiu ĉi rakonto fariĝas antaŭkuranto de absurdo. Tiam, Flora Feino, sendinta Alberton al la mondo de la musoj, estus sendinta iun superintelektulon en la homan socion...

## La senco de musa vivo - Ĉarma libro

Mizro Iwaya

Jes, ĉarma. Unue, tiu ĉi libro estas malgranda kaj maldika. Ĝi havas nur 40 paĝojn. Oni povas legi ĝin en mallonga tempo. Due, ĝi entenas ĉarmajn bildojn. Kredeble ili estas ellaborita de A.I. Mi admiras lastatempan evoluon de komputila arto. Tiu ĉi aŭtoro bone manipulas komputilon. La rezulto estas ne majstra, sed ĉarma.

La historio estas simpla. Lu junulo ĉiutage studadis diligente por eniri bonan universitaton. Sed musoj en la domo malhelpas lian klopodon. Li komencis ekstermi ilin. En la sekva tago li trovis sin transformiĝinta al muso! Surprizita, sed li devis vivi la malfacilan vivon de muso. Lia klopodo vekis lin pri la senco de musa vivo. Ĉiu vivaĵo havas sian sencon. Kiam li revenis al la homa mondo, li decidis studi arkitekturon kaj urboplanadon por serĉi harmonian kunekziston de ĉiuj vivaĵoj.

Tiu historio similas al “La transformiĝo” de Kafka. Sed, distinge de Kafka, tiu ĉi libro estas simpla kun “*happy end*”. La transformiĝo de tiu junulo estis nur kariera epizodo kiu donis unikan lecionon al li. Li lernis ke ĉiu estaĵo havas sian sencon, tial ni devas serĉi harmonion inter ili.

Tiu konstato estas ĉarma. Sed ĉu tio estas realigebla? Ekzistas diversaj religioj en la mondo. Mi aŭdis ke kelkaj kredas harmonion de ĉiuj vivaĵoj kaj neniam mortigas eĉ etan estaĵon de la mondo, ekzemple puloj kaj moskitoj. Sed ni scias kiel malfacila estas tia vivo! Ni povas mense manipuli tian ideon, sed praktiko estas for de ni.

Laste mi volas mencii ke ekzistas kelkaj dubindaj esprimoj en tiu libro. Unu ekzemplo estas la vorto “kontinui” kiu aperas multfoje en la libro. Ĉu ĝi ne devas esti “daŭrigi”?

## “La senco de musa vivo” verkita de Aleksandra Watanuki

Murata Kazuyo

La fabelo estas tre ĉarma kun belegaj desegnaĵoj. Mi tre ŝatas belegajn fotojn.

La plej bonaj estas la figuroj de amindaj musoj kaj belegaj floroj.

Kaj enhavo estas fikcia rakonto. Minjo amis

musojn, kiuj loĝas sur iu arbo en ĝardeno. La musoj iras al grajnejo en la domo de Minjo ĉiutage. Dume la kato Rufo atendas ilin por kapti. Minjo metis tubon por preventi ilin for de Rufo. Sed la tubo estis bedaŭrinde iom



mallonga. Vidinte la klopodon de fratino, la frato Alberto mokis ŝin. Li tute ne havis kompaton al musoj.

En iu tago la ĉefrolulo nomata Alberto estis subite ŝanĝigita de Flora Feino, al eta muso. Li spertis la musan vivon, kaj komprenis pri la danĝereco. Ekde tiam li helpis fratinon preventi musojn el la atako de kato.

En Japanio oni ne ŝatas ratojn, precipe nomatan “*dobu-nezumi* (bruna rato)” kaj “*kuma-nezumi* (nigra rato)” Ĉar ili loĝas en

malpura loko, kaj bakterion disvastigas. Ili manĝas ĉefe grajnoj, krome multe damaĝas lignajn meblojn.

Temas pri “muso, japane nomata *hacuka-nezumi* (二十日鼠), ili estas malgrandaj (12-30 g, 6.5-9.5 cm) kaj vivas 1-1.5 jarojn. Ili fariĝas gravedpova 45 tagojn post la naskiĝo, kaj naskas idojn 20 tagojn poste. Ili naskas 6 idojn en unu fojo, kaj 5-6 fojojn jare, pro tio muso plimultiĝas en geometria progresio (ネズミ算式の増加). Do estas malfacile preventi ilin, ĉu ne?

---

## Pri la libro “Paradizo Ŝtelita”

---

Nia grupo Jokohama Salono finlegis la libron “Paradizo Ŝtelita” de Trevor Steele post 2 jaroj kaj duono da komuna legado. Jen sube estas impresoj de ĉiuj membroj.

### “Paradizo Ŝtelita”

Mizro Iwaya

Tragika historio de aŭstraliaj aborigenoj aperas tie kaj ĉi tie. Ankaŭ tiu ĉi aŭtoro jam montris plurajn verkojn pri tio. Nun mi legis la titolitan libron kaj refoje konstatis ĝian historion. Mi vidas ke la historio en la libro estas sufiĉe reala kaj ĝusta ke ĝi povas esti aktuala dokumento pri la aborigenoj.

Mia unua impresoj pri la libro estas ke ĝi havas komplikajn strukturon kaj ne estas facile solvebla. Kiel la aŭtoro skribis ĉe la fino, la fundamenta problemoj estas la alveno mem de la blankuloj al la lando. La libro konsistas el diversaj ĉapitroj kun diversaj jaroj kaj scenejoj. Sed la aŭtoro ne klarigas jaron kaj scenejon ĉe la komenco kaj legantoj devas cerbumi pri ili laŭ la enhavo. Tial Vikipedio estis nepre necesa por deĉifri ilin. Mi esperas havi aŭ indikon pri jaro kaj scenejo, aŭ biografiaj rimarkoj.

Nu, mi volas kompari la titolitan verkon kun aliaj verkoj. Unue mi volas mencii la libron “Flugi kun kakatuo” de la sama aŭtoro. Ankaŭ ĝia temo estas konflikto inter aborigenoj kaj blankuloj. Mi volas diri ke tiuj libroj estas ĝemelaj verkoj de la sama aŭtoro. Dum Paradizo pritraktas negocian flankon de la konflikto, Flugi pritraktas batalan flankon. Tial mi vidas ke la lasta estas pli aktiva kaj la unua pli statika. Mi volas montri alian malsamecon de la du verkoj. Flugi havas preskaŭ laŭordan tempopason,

sed Paradizo havas zigzagan kaj komplikajn tempopason. Tial oni povas pli facile legi Flugi, kaj Paradizo postulas pli da nervostreĉo.

Nun mi volas kompari la titolitan libron kun “La granda kaldrono” de John Francis. Tiu Kaldrono estas grandega libro kun 600 paĝoj. Nature la protagonistoj estas pluraj. Mi vidas ke tempo kaj loko varias ankaŭ en tiu libro sen klara indiko. Tial ni devas atente legi por deĉifri la temon kaj la lokon. Sed sama afero ripetas sin tra la verko. Do unue diĉifrita, ni povas legi poste sen pendanta dubo pri la sceno. Dume pri Paradizo tempo kaj loko varias en ĉiu epizodo, tial ni devas ĉiam streĉi nian nervon dum la legado.

Finfine mi volas diri ke mi lernis multon pri la konflikto inter aborigenoj kaj blankuloj per tiu libro. Kaj nuntempe, kiam mi vizitis Aŭstralion, mi vidis nigrulojn en la urbo. Ili aspektis liberaj, sed ne feliĉaj. Jam pasis ĉirkaŭ 200 jaroj de la tempo de Robinson, sed la problemoj ne estas komplete solvitaj. Miksiĝo de du malsamaj kulturoj kaŭzas longan spuron da vortico.

## 40 jaroj da historia enketado

— La epoko de “Paradizo Ŝtelita” de Trevor Steele —

Sibayama Zyun’iti

En 2 jaroj kaj duono, nia grupo finlegis historian fikciaĵon de aŭstraliano Trevor Steele,

“Paradizo Ŝtelita”. Ĝi estas kvazaŭa nefikciaĵo, en kiu sennoma “historiisto” enketas multajn personojn en Van-Dimen-Lando (poste renomita al Tasmanio), brita kolonio, kaj kelkajn personojn en Anglujo. Tiu enketado ekis en la jaro 1836 aŭ 1837, kaj finis en la jaro 1876, do por 40 jaroj.

Nu, pri kio la historiisto enketis, al kiuj? Temas ĉefe pri la vivo de George Augustus Robinson, alveninta al Van-Dimen-Lando en 1824, mortis en 1866, kaj vicĉefe al virino Trukanini, aborigeno kaj multjara partnero al Robinson — aŭ ĉu multjara viktimo? Mi intence detale notis supre la jarojn, ĉar dum legado, mi kaj multaj grupanoj preskaŭ ne konas, en kiu jaro kio okazis, kaj tio malfaciligis la komprenon. La jarCIFeroj ĉi tie notitaj estis prenitaj de Wikipedia ktp.

El tiu vidpunkto por kompreni la tempon kaj lokon de la okazaĵo, la ĉapitrokomenca priskribo en fikcioj historiaj, ekzemple ĉe “Vojaĝo al Kazohinio”, multe helpus la legantojn.

Nu, Van-Dimen-Lando estas iom malpli granda ol Hokkajdo, kaj situanta preskaŭ samdistance for de ekvatoro al Hokkajdo. En la insulo loĝis aborigenoj en primitiva stato, kaj blankuloj iom post iom rabis la teron, mortigis la aborigenajn homojn. Trukanini estis la lasta aborigeno en la insulo. La rolo de Robinson estis “ĝentile trakti la aborigenojn en humana maniero”, al kiu Trukanini kaj ŝiaj grupanoj helpis, dum aliaj ĝeneralaj blankuloj traktis la aborigenojn kruele. Sed la historio estis ironia — fine Robinson helpis en neniigado de la aborigenoj.

Robinson agis pli bone ol siatempaj blankuloj, klopodante lerni la lingvon uzatan de la aborigenoj, kion tute ne provis fari la blankulaj

okupantoj. Tion mi komprenas. Sed Robinson samtempe celas kristanigi la aborigenojn senrezulte. La pasio por tio ne estas bone komprenebla al mi japano, ne-kristano.

Nu, tamen, kiel leganto de fikcio, mi miras la energion de la historiisto prifosi la historion de Robinson kaj liaj ĉirkaŭuloj. Cetere “amosento de la historiisto al la virino, kunvivinta kun maljuna Trukanini” estas pli fokusinda.

## Finleginte “Paradizo Ŝtelita”

SIBAYAMA Noriko

Nia lernogrupa “Jokohama Salono” finfine tralegis la libron “Paradizo Ŝtelita”. Ĝi estis iom malfacila al mi, kaj se mi sola eklegus, post nelonge mi rezignus plulegi. Dank’ al la grupanoj mi povis finlegi la libron.

Kial malfacilas al mi la libro? Unue mi preskaŭ ne sciis historion de aborigenoj kaj Tasmanio. Due la epizodoj saltis tien kaj reen loke kaj tempe.

Mi unuafoje vidis la nomojn Trukanini kaj George Augustus Robinson en tiu ĉi verko. Ĉu la nomoj estas fame konataj en Aŭstralio? En aŭstraliaj lernejoj oni instruas tian historion? Ni legis la libron fojfoje referencante Vikipedion. Tie mi vidis portretojn de Trukanini kaj Robinson kaj aliaj rolantoj. Tiam mi povis senti realecon. Finleginte la libron multaj aperintaj nomoj fariĝis karaj al mi. La nomo Robinson ankaŭ fariĝis intima nomo al mi kvankam komence kiel bona karaktero, sed fine ruza.

Ĉu Robinson vere portis perukon? Kaj tiel serioze li emis kaŝi la kapon? Tia sceno ege amuzis min.

Robinson estis komence amikema al aborigenoj tamen poste li fariĝis ruzulo blindigite de avido. Sed ĉu ni povas riproĉi lin?

Mi ĝojas, ke mi eksciis eĉ iomete la historion de aborigenoj en Tasmanio. Pro tio mi dankas al s-ro Trevor Steele kaj niaj salonanoj.

Krome, kiam ni ricevis la librojn el UEA, kelkaj estis misbinditaj. UEA rimarkis la misbindadon, kaj algluis paĝojn por orde legebla, kaj vendis sen komento. Tial komence ni provis malglui la paĝojn nesciante intence algluitajn. (Du el niaj grupanoj mendis bitan version, do ili neniom da ĝeno sentis.)



G.A.Robinson (1791-1866) Trukanini (1812?-1876)  
(la fotoj el Vikipedio)

## Pri “Paradizo Ŝtelita”

AKIYA Hideo

Ĉi tiu romano temas pri ekstermiĝo de homa gento okazinta en Tasmanio (tiam Van-Dimen-Lando), Aŭstralio en la 19-a jarcento. Antaŭe mi sciis preskaŭ neniom pri la historia tragedio de tieaj indiĝenoj, tasmaniaj aborigenoj, krom ke ĝi okazis laŭ aŭ pro la koloniado de eŭropanoj dum tiu jarcento.

Dank’ al ĉi tiu libro de Trevor Steele mi havis ŝancon ekscii epizodojn en la okazintaĵo. La rakonto disvolviĝas ĉefe laŭ la Mision de Amikeco gvidita de George Augustus Robinson. Kun helpo de kelkaj indiĝenoj el la insulo Nuenone, la misio transloĝigis centon da aborigenoj en periferiajn insulojn por protekti ilin de konfliktoj kun la setlantaj blankuloj sur la ĉeftero de Van-Dimen-Lando.

La aŭtoro ofte uzis intervjuajn dialogojn por priskribi multajn figurojn, inkluzive de la ĉefroluloj Robinson kaj Trukanini, la lasta virino de la tasmaniaj aborigenoj. Ĉiuj karakteroj estis klare reliefigitaj. Tamen, iom mi bedaŭras, ke historiaj faktoj, aparte, la jaroj de specifaj epizodoj ne estis definitive montritaj. Tio estis iom konfuza al mi.

La alia bedaŭro estas, ke la romano malmulte rakontas pri la kulturo kaj historio de la indiĝenoj antaŭ la setlado de eŭropanoj. Kredeble, la tiam nomata Van-Dimen-Lando ankaŭ havis originan indiĝenan nomon, sed ĝi ne aperis en la libro. Vuradi, la edzo de Trukanini, ŝajnis bona rakontisto de la tribo Nuenone. Malgraŭ tio, detaloj de lia rakontado ne estis prezentitaj en la romano. Do, mi ne povis imagi, kia estis la “Paradizo” al la indiĝenoj.

Onidire, kaŭzoj de la ekstermiĝo estas masakra pafado de la setlantoj kaj infektado de mortiga malsano el la eŭropanoj. Tamen, mi supozas, ke krom ili tion influis senscienco kaj nekomprene de eŭropanoj pri la nomada vivmaniero, kulturo kaj historio de la indiĝenoj. La granda plejmulto de blankuloj nur rigardis ilin senkulturaj primitivuloj.

Robinson vole studis la indiĝenan lingvon por interkompreno, sed eĉ li fine montris sian esencon kiel nura ordinara eŭropano. Li kondukis kiel superulo al la indiĝenoj kaj provis trudi sian eŭropanan kristanisman kaj la anglalingvon. Li

neniam akceptis konsilon de la kuracisto, kiu zorgis pri la eblo, ke la foriĝo de la indiĝenoj el la hejmlando despere suferigis ilin kun malsano.

La “amikeca” misio ŝajne estis sukceso al Robinson kaj plejparto de la blankuloj, ĉar la indiĝenoj estis fine forigitaj disde la ĉeftero de Van-Dimen-Lando, sia hejmlando. Sed, ties celo protekti aborigenojn estis supraĵo. La medio de iliaj setlejoj estis severa kaj malfacila por vivi, ne plu estis paradizo. Eble la migrado rapidigis la ekstermiĝon de la indiĝenoj.

## Leginte “Paradizo Ŝtelita”

Hirai Isako

Kiam mi renkontis tiun libron, mi iomete estis embarasita, ĉar tiu titolo estis la unua de tiu verkisto Trevor Steele, ankaŭ tiu rakonto estis tute ekster de mia intereso.

La historiisto, nome verkisto, venis insulon Tasmanio, por esplori aborigenojn kaj ilian historion. Pere de multaj homoj li provis klarigi la procezon ke aborigenoj formortis. La metodo estis kontakto kaj intervjuo.

Kiam Britio provis kolonii ĉi tiun insulon, Robinson laboris kiel kunordiganto inter barbaroj kaj setlantoj por civilizaci kaj kristanigi la aborigenojn. Li provis plenumi sian taskon, organizis “Mision de Amikeco” kaj gvidas postvivantaj aborigenojn. Por la fina celo li prenis devigajn manierojn. Ilia baza vivstilo estas nomado, tute kontraŭ nia vivstilo, kaj ĝi ege influas mense kaj fizike la aborigenojn. En nekutima vivmedio ili estis sub streso kaj malsaniĝis, fine rezultigis formorton. Iusence Robinson ludis grandan rolon en la tasko, sed li laboris pelita de sia deziro.

Ekzisto de Trukanini estis granda helpo por Robinson. Fine li sukcesis igi Trukanini fidi lin. Sed Robinson grade vidis ŝin kiel seksan objekton. Trukanini origine povus vivi en libera medio, nome “Paradizo” sed ŝi estis perfidita de Robinson, kiu koncentras sian promocion kaj celas fariĝi riĉulon, kaj kiu plenumis sian celon. Malantaŭ la koloniaj politikoj de Britio estis tragedioj de aborigenoj, kiuj estis forpelitaj de siaj liberaj kaj naturaj vivadoj. La historio montras nin, ke en multaj kazoj aborigenoj formortis sub regado de granda potenco.

La historia fono de tiu romano ne estas kronologie rakontata, vagadas tien kaj reen, do

estis malfacile kapti la influon de rakonto, kaj ankaŭ tre malfacile por mi sekvi kaj kompreni ĉi tiun rakonton. Helpe de membroj de legokunsido, mi apenaŭ finlegis ĝin, sed mi ne interesiĝis pri ĉi tiu rakonto ĝis la fino.

## Paradizo Ŝtelita

Murata Kazuyo

Tiu ĉi rakonto estas raporto pri izoligo de aborigenoj, kiuj loĝis en fora Insulo Tasmanio (tiam estis nomita Van-Dimen-Lando), kiu situas sudoriente de Aŭstralio. Ekde 1803 la registaro de Anglio planis konstrui prizonojn por mortokondamnitaj krimuloj. Ĉar multiĝis tiuj krimuloj en Londono, oni bezonis pli da prizonoj.

Krome oni varbis elmigrantojn al Tasmanio por havigi al ili vastan terenon.

Tiam en la insulo Tasmanio loĝis ĉirkaŭ 3600 aborigenoj, kaj vivis senprobleme kaj feliĉe kiel en Paradizo, farante ĉasadon de kangruoj aŭ birdoj. Ili estis nudpiedaj kaj preskaŭ ne surmetis vestojn. Ili loĝis en arbaro sendome. Tiam angloj pensis, ke “ni devas eduki ilin same kiel ni”. Laŭ la angloj aborigenoj devas fariĝi kristanoj.

Ili uzis nur lancojn, sed la anglaj soldatoj uzis pafilojn por forpeli ilin, oni permesis kapti kaj mortigi ilin kaj faris genocidon. Post 1830aj jaroj ilia nombro fariĝis nur 300. La angla registaro memkritikis la kruelan manieron, kaj ŝanĝis la planon.

Por preventi batalojn inter blankuloj kaj aborigenoj, oni pelis aborigenojn al malgranda insulo. La estro de la projekto estis Robinson

(1829).

Li entuziasme lernis ilian lingvon kaj fariĝis intima kun ili. Li gvidis ilin al paca insulo, sed kompreneble ili ne povis vivi sen ĉasado kaj bezonis vastan teritorion.

Robinson rekomendis al ili agrikulturon, sed ili preskaŭ ne povis ŝanĝi vivmanieron. Krome aborigenoj tute ne havis imunecon, el Eŭropo oni kunportis diversajn bakteriojn aŭ virusojn, pro tio multaj malsaniĝis kaj mortis.

En la granda insulo Tasmanio aborigenoj loĝis diversloke laŭ siaj gentoj, la projekto-membroj de Robinson devis sinsekve piede viziti ilin; tio estis tre peza laboro. Kaj Robinson persvadis ilin por translokiĝo, kun la helpo de Trukanini, kiu estis saĝa kaj juna aborigenino, lia laboro pli kaj pli progresis.(1839)

Sed la lasta insulo Flinders ne havis bonan naturon kaj medion, en 1844 ilia nombro estis 57, sed en 1855 estis 15 kaj plie malmultiĝis. Finfine la lasta persono Trukanini forpasis en 1873.

La rakonto estis interesa, sed post kiam la aborigenoj rezignis loĝi en Flinders kaj translokiĝis al Aŭstralio, Robinson perdis kuraĝon kaj esperon por lia laboro(tasko). Kaj li okupis sin nur pri mongajno.

Mi tute ne havis intereson kaj ĉarmon pri tia li, kaj ne deziris legi plu.

Tiun ĉi rakonton raportis iu historiisto, kiu intervjuis al diversaj homoj. Sed en la rakonto mankis mencio pri jaro (tempo) kaj enhavo estis kompleksa. Pro tio ni legantoj multe embarasiĝis.

## sezonvorto novembra

### “Kogarashi Ichigo” (la unua ventego de la sezono)

(木枯らし1号)

Okita Kazumi

La unua forta vento el nordo, kiu blovas de la mezo de oktobro ĝis la fino de novembro, estas nomata “Kogarashi Ichigo”.

Ekde ĉirkaŭ 1965, la Meteorologia Agentejo informas pri la unua forta vento de la jaro per veterprognozoj, dirante: “Hodiaŭ blovis Kogarashi Ichigo”.





## Dek spertoj prezentitaj

En la 16a de septembro, ĉe nia Esperanto-Muzeo Jokohama, okazis kutima jara programo “Prezento de Spertoj”, en kiu niaj membroj parolas sian sperton en Esperanto. Ĉi-jare estis 10 prezentoj, kaj ĉeestis la kunvenon 19 personoj (inkluzive de la prezentantoj). Imponis 2 prezentoj de la partoprenintoj al la Universala Kongreso en Afriko. Kelkaj el la prezentoj aperis/aperas en tiu ĉi organo, kun signo <NT400> por la lasta numero, <NT401> por tiu ĉi numero.

- 13:30 malfermo, kaj sinprezento de tiuj, kiuj ĉi-tage ne prezentos ion specialan. El la sinprezento, tiu de la nova membro, s-ino Tsukada Yuuko aperas en <NT401>
- 13:45 Mizro Iwaya: La Subĉiela Muzeo kaj Venecia-Glasa Muzeo de Hakone
- 13:55 Murata Kazujo: Leginte “Paradizo Ŝtelita” <NT401>
- 14:10 Miyazaki Hideko: Prezento de Ukuleleo <NT401>
- 14:25 Sibayama Zyun’iti: En kiu tago mortis Verda Majo? <NT400>
- 14:40 Kanoo Hirojuki: La Gimnastika Tago

### Sinprezento de Tsukada Yuuko

Mi estas Tsukada Yuuko.

Unuafoje mi venis al la muzeo antaŭ 6 monatoj kaj lernas Esperanton en la kurso de s-ino Doi Ĉieko en ĉiu sabato.

Do mi estas nova esperantisto.

Sed en fakto mi ne estas nova esperantisto.

Antaŭ pli ol 20 jaroj mi eksciis Esperanton en Kobe, kie mi naskiĝis.

Mi apartenis al Kobe Esperanto-Societo ĉirkaŭ 1 aŭ 2 jaroj.

Tie mi lernis Esperanton, kaj ĉeestis en Kansaja Kongreso de Esperanto.

Tiam mi salutis malfermon de la kunveno.

Kaj mi partoprenis en la somera kurso en San-Francisko.

Tial mi estas malnova esperantisto.

Sed en ĉiu printempo mi memoris la Esperantajn vortojn nur malmulte.

Kvankam oni diras ke Esperanto estas facila lingvo, mi ne pensas tiel.

Mi ne ŝatas studi kaj memori.

La plej necesa afero por mi estas lernado dum longa periodo.

Mi lernu iom post iom.

en Elementa Lernejo en Hodogaja

- 14:55 Doi Ĉieko: La Geneza tempo de Hama-Rondo  
– dek-minuta paŭzo –
- 15:20 Toĵo Joŝijuki: Mia Vizito al Hongkongo <NT400>  
(anstataŭlegita sen la ĉeesto de la aŭtoro)
- 15:30 Suzuki Keiichiro: Aruŝa UK kaj Tanzanio
- 16:00 Namba Fumiharu: Epizodoj dum mia vojaĝo en Tanzanio
- 16:40 Doi Hirokaz: Nuna stato de biblioteko en Esperanto-Muzeo Jokohama

### Prezento de ukuleleo

Miyazaki Hideko

Saluton. Hodiaŭ mi parolas pri la ukuleleo.

Mi aĉetis mian ukuleleon fine de 2019, ĉar mi volis praktiki facilan muzikan instrumenton.

Estis malfacile praktiki sola, do mi aliĝis al la klubo ĉirkaŭ mia domo.

Mi ekzercis en ĝi, kaj en aprilo de tiu ĉi jaro, mi partoprenis koncerton kun aliaj klubanoj.

La ukuleleo estas muzika instrumento alportita al Havajo, fare de portugala enmigrintoj en la jaro 1879.

La signifo de la vorto ukuleleo estas flugantaj puloj. Ĝi nun estas ludita ne nur en Havajo, sed ĉie en la mondo. Gitaro havas ses kordojn, sed ukuleleo havas nur kvar. Do, ĝi estas facila, ĉu ne?

Fine de la prezento, mi kantas tri esperantajn kantojn kun ukuleleo.

